

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 62, januaro-februaro 2023



Universala Esperanto-Asocio

Universala Esperanto-Asocio markas 75 jarojn da sindediĉo al homaj rajtoj



Universala Esperanto-Asocio ne atendis ĝis la jaro 2023 por festi 75 jarojn da sindediĉo al homaj rajtoj: la Esperanto-movado festas sian propran homrajtan jubileon. La mesaĝo de UEA okaze de Homrajta Tago, 10 decembro 2022, atentigas, ke “nia organizo, la Universala Esperanto-Asocio, kunveninta en Berno, Svislando, en 1947, deklaris, ke ‘la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo.’ Tiel ĝi anticipis la ekvalidiĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en 1948 per pli ol unu jaro; kaj tiel, de tiam ĝis hodiaŭ, ĝi subtenas la agadon de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por homaj rajtoj ĝenerale kaj lingvaj rajtoj tute aparte.”

La mesaĝo plue deklaras, ke “la sinteno de UEA koncerne homajn rajtojn, laŭ la rezolucio de 1947, ‘estas diktata de la ideoj celoj de la Esperanto-movado.’ La movado por Esperanto ja rilatas al disvastigo de facile akirebla internacia lingvo por ĉies uzo, sed la idealo malantaŭ tiu movado estas eĉ pli vasta: pacigo kaj kunlaborigo de la homoj je tutmonda skalo.”

Zamenhofa Tago honoras la kreinton de Esperanto

Ludoviko Zamenhof, kreinto de Esperanto, la internacia lingvo kiu nun troviĝas ĉie en la mondo, naskiĝis la 15-an de decembro, 1859 – dato festata ĉiujare de la esperantista komunumo. La Zamenhofa Tago estas okazo kiam oni instigas esperantistojn, ke ili subtenu Esperanto-eldonistojn per aĉeto kaj legado de la ĉiam kreskanta literaturo en Esperanto. Ankaŭ temas pri tago por konsideri la gravecon de lingva komunikado. “Lingvo estas la peranto de ĉio kion ni faras, de ĉiu progreso celanta plenan observon de homaj rajtoj, plenan pacon kaj evoluigon por ĉiuj” laŭ la mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Zamenhofa Tago 2022. “La mondo bezonas unuecon ĉirkaŭ tiuj fundamentaj ideoj, kaj tiu unueco eblas nur, se ni estas kapablaj respekti diferencojn kaj samtempe esti reciproke aŭskultataj.” La Asocio emfazas, ke komunikado estas multe pli ol paroli per lingvoj kiujn oni povas kompreni: temas ankaŭ pri aŭskultado de aliaj personoj, aŭdi kion ili diras, kaj kunlabori por pli bona mondo.

La Esperanto-kalendaro *Eventa Servo* listigas entute 35 aranĝojn en diversaj landoj okaze de la Zamenhofa Tago, kaj plurajn virtualajn kunvenojn. Inter la landoj menciitaj estas Argentino, Aŭstralio,

Belgio, Britio, Ĉeĥio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Kanado, Madagaskaro, Meksiko, Pollando, Portugalio, Rumanio, Rusio, Slovakio, Svislando, Tajlando, Togolando, kaj Usono.

Revuoj en Esperanto kovras la mondon

Kvankam blogoj, retejoj, videoj kaj plej diversaj aliaj elektronikaj komunikiloj abundas en la internacia lingvo Esperanto, ankaŭ presitaj revuoj daŭre allogas legantojn.

- Lastatempa numero de *Etnismo*, ekzemple, priskribas la situacion de indiĝenaj komunumoj en Centra Afriko kaptitaj inter tradiciaj moroj kaj programoj por naturokonservado.
- La ĉiumonata novaĵorevuo *Monato* raportis en sia novembra numero pri granda gamo de temoj, ekde nuklea malarmado ĝis la konservado de birdospecioj en Koreio kaj Slovakio.
- La monata revuo de Universala Esperanto-Asocio, la revuo *Esperanto*, enhavas raportojn pri la Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo.
- La revuo *Unesko-Kuriero*, la Esperanto-eldono de *UNESCO Courier*, fokusiĝas en lastatempa numero pri la arto kaj scienco de tradukado.

Jen nur kvar el dekoj da revuoj regule aperigataj en Esperanto pri larĝa gamo de temoj.

Nacia premio honoras polan esperantiston

Laŭ iniciato de la Pola Esperanto-Asocio, la Ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, Piotr Gliński, lastatempe atribuis al la konata pola esperantisto Roman Dobrzyński la bronzan medalon "Gloria Artis." En sia propono, la Asocio emfazis la signifan kontribuon de Dobrzyński al la popularigo de kulturo ĝenerale kaj liajn specifajn meritojn kiel prezidanto de PEA, kiam li rolis kiel ĉefa organizanto de la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en la jaro 1987. Tiu kongreso, kiu festis la centjariĝon de Esperanto, amase allogis homojn el la tuta mondo, precipe de okcidente kaj oriente de la Fera Kurteno. La kongreso, kun proks. 6000 partoprenantoj, restas historie la plej granda renkontiĝo de esperantistoj iam ajn okazinta.

Roman Dobrzyński estas eble plej bone konata en la propra lando kiel televida raportisto kiu ĉeestis multajn historiajn okazintaĵojn kaj aŭtoris ĉ. 300 dokumentajn filmojn. En 1980 la Asocio de Polaj ĵurnalistoj nomis lin la plej bona publicisto pri internaciaj aferoj. Liaj dokumentaj filmoj inkluzivas plurajn en Esperanto, kaj li estas ankaŭ bone konata kiel aŭtoro, kune kun Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, de *La Zamenhof-strato*, serio da intervjuoj pri Esperanto kaj la familio Zamenhof, originale verkitaj en Esperanto kaj poste tradukitaj en plurajn aliajn lingvojn. Anglalingva traduko estas nun en preparo.

Komitato traktas lingvajn kaj minoritatajn rajtojn

La Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj (CoLL), prezidata de profesoro Francis M. Hult, kiu, kune kun kolegoj, reprezentas Universalan Esperanto-Asocion ĉe Unuiĝintaj Nacioj, traktis lingvojn kaj minoritatajn rajtojn en sia kunveno de 28 novembro. Malgraŭ Artikolo 1 de la Ĉarto de UN kaj Artikolo 2 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, "lingvaj minoritatoj tra la tuta mondo daŭre spertas defiojn

al siaj lingvaj rajtoj, kune kun neegala aliro al aliaj civilaj kaj homaj rajtoj,” laŭ la anonco de la virtuala kunveno. La kunveno havis formon de dialoga forumo kun la Speciala Raportisto de UN pri Minoritataj Demandoj. prof. Fernand de Varennes, kiu skizis plurajn malfacilaĵojn kiujn frontas lingvaj minoritatoj kaj la mankon de atento al diskriminacio surbaze de lingvaj diferencoj.

La Komitato, kiu kunvenigas NROjn (Neregistarajn Organizaĵojn) kiuj interesiĝas pri lingvaj demandoj, nun mezias en sia dua jaro de agado. Ĝia estraro enhavas du grandajn organizaĵojn kun fortaj ligoj al UN: la Internacian Asocion de Konferencaj Interpretistoj kaj la Internacian Federacion de Tradukistoj. Inter la komitataj sesioj planataj por la venonta jaro estas kunvenoj pri la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj kaj pri novaj horizontoj por interpretaj kaj tradukaj teknologioj.

La Komunumo de NROj estas nesufiĉe engaĝita de UN, laŭ reprezentanto de UEA

Dum rimarkoj la 13-an de decembro dum konsultiĝo kun NROj (neregistaraj organizaĵoj), organizita de la Komitato pri NROj de EKOSOK (la Ekonomika kaj Socia Konsilio de UN), la reprezentanto de UEA, Humphrey Tonkin, kritikis la komitaton, kaj implice la tutan UN, pro ties manko de atento al NROj kaj iliaj bezonoj. Laŭ Tonkin, la rilatoj de EKOSOK al NROj estas draste subfinancataj – unu el kies efikoj estas manko de atento al multlingvismo kaj al la graveco de engaĝiĝo de la civila socio en lingvoj kiujn tiu socio parolas kaj komprenas.

Unuiĝintaj Nacioj estas organizo de registaroj, kaj registaroj havas limigitan povon, atentigis Tonkin. La civila socio estas esenca aliancano “se iam ni solvu la grandegajn ekzistopovajn problemojn kiujn frontas la homaro. Sed tio implicas etendi la manon al civilsociaj organizaĵoj en lingvoj kiujn ili (kaj la homoj kiujn ili reprezentas) komprenas – kaj precipe aŭskulti kion diras tiuj organizaĵoj, je *iliaj* kondiĉoj prefere ol tiuj de UN, kiu tiel forte dependigas sin de la angla kaj certaj grandaj lingvoj.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.